2a Jaro JANUARO 1912. Nro 1.

# Internacia Pedagogia Revuo

Oficiala organo de la
**Internacia Asocio de Instruistoj.**
Membra kotizaĵo por 1 jaro kun la monata revuo : 1 Sm. (Fr. 2,50)
Specimena numero 0,1 Sm. (Fr. 0,25)

REDAKTORO-ADMINISTRANTO JAN JACOBS,
— BOOMSCHE STEENWEG, 444, ANTWERPEN. BELGUJO. —

## ESTIMATAJ LEGANTOJ.

Jén do Internacia Pedagogia Revuo, kiu ree aperas, post dormado de pli ol unu jaro ! La malnovaj membroj eble tre miros vidante tiun ĉi malgrandan paperaĵon kaj certe ne plu rekonos en ĝi ĝiajn karajn, boneprizorgitajn, belajn, dikajn, interesplenajn antaŭintojn. Sed, ĉu longedaŭra dormado aŭ ripozado ne malfortiĝas la korpon? Ankaŭ nia kara revuo malfortiĝis dum sia dormado. Sed nun ĝi denove vekiĝis. Estas certe ke pro la bonaj zorgoj de sindonaj flegantoj, de laboremaj kunlaborantoj, Internacia Pedagogia Revuo, baldaŭ retrovos sian antaŭan bonfarton ; ĝi plifortiĝos kaj kreskados, malgraŭ ĉia malhelpo. « Ĝi vivu ! » estis la unuvoĉa deziro de la geinstruistoj kunvenintaj en Antverpeno dum la 7a kaj.... ĝi vivados!

LA REDAKCIO.

## Kunvenoj de la Internacia Asocio de Instruistoj (I. A I.)

### DUM LA SEPA KONGRESO EN ANTVERPENO.

### UNUA KUNVENO — MARDON, LA 22an DE AŬGUSTO 1911.

Ĉeestas 59 gekolegoj.

Sro Durieux (Francujo) malfermas la kunsidon, kaj klopodas por starigi la estraron de l' kunveno. Estas elektitaj Prezidanto : Sro Durieux (Francujo) ; Sekretario : Sro Aizière (Francujo) ; Helpantoj : Sro Tyck (Belgujo) kaj Sino Elsa Henkel (Germanujo).

Sro Durieux memorigas, ke I. A. I. estis kreita je la kongreso de Dresdeno en 1908 kaj konigas la nomojn de la estraro de tiu asocio.

Li bedaŭras la foreston de Sroj Cart, Maréchal, Romaño Frenkel, de Sino Wapaten kaj de Sro Ĉejka, kasisto kaj administranto de la Pedagogia Revuo. Ĝis nun nur tri numeroj de tiu gazeto aperis, la kvara estas presita.

Sro Durieux proponas, ke, laŭ la regularo de I. A. I., oni anstataŭu la trionon de la komitatanoj. La sorto decidas, ke estos anstataŭataj Sro Avilov (Rusujo), Sro Frenkel (Rusujo), Sro Backheuser (Brazilio).

Post demando de Sro Vogler (Germanujo) estas decidita, ke ĉiuj ĉeestantoj povos partopreni la elekton kaj la diskuton de ĝeneralaj aferoj.

Estas elektitaj : Sro Christaller (Germanujo), Sro Building (Anglujo), Sro Backheuser (Brazilio).

Plua komitatano Sro Jacobs (Belgujo) estas ankaŭ elektita.

Sro Durieux montras, ke nia societo nur vivetas.

Sro Jacobs, korespondanto de Sro Ĉejka, diras, ke Sro Ĉejka devis momente forlasi ĉian esperantan laboron pro troa alia privata okupado.

La Prezidanto petas Sron Jacobs, ke amike li bonvolu trans doni al Sro Ĉejka niajn dankojn por liaj antaŭaj servoj kaj niajn bedaŭrojn ke li ne povas daŭrigi ilin. Kiu do prenos sur sin la eldonon de l'organo de l'asocio ?

Sro Camescasse (Francujo) proponas, ke almenaŭ provizore oni publikigu nur oficialajn dokumentojn en internacia gazeto. en ĵurnalo « Esperanto » ekzemple.

Diversaj gekolegoj deziras, ke oni daŭrigu la publikadon de la Revuo. Sro Durieux esprimas la deziron, ke estu en ĉiu lando almenaŭ unu reprezentanto de la societo por ricevi monon kaj varbi novajn anojn. Estas tre maloportune, kiam nur unu homo posedas la adresojn de ĉiuj societanoj.

Proksima kunveno decidos pri la eldono de nia gazeto.

DUA KUNVENO — MERKREDON, LA 23an DE AŬGUSTO.

Prezidanto : Sro Durieux.

Legado kaj akcepto de l'raporto pri la antaŭa kunsido.

Sro Walter-Kohli (Germanujo) salutas la ĉeestantojn je l' nomo de la politeknika asocio de Anhalt, kiun li reprezentas.

La prezidanto varme dankas nian kolegon. Korajn dankojn li esprimas ankaŭ al Sroj Mouton kaj Camescasse (Francujo), kiuj faris mondonacon al nia asocio.

Sro Jacobs (Belgujo) diras, ke post pripensado kaj interparolado kun diversaj kompetentaj amikoj, li eventuale akceptos la taskon eldoni nian revuon. Jam li kolektis precizajn sciigojn pri la kosto de presigo de nia gazeto. Li opinias, ke daŭrigi la publikadon de nia revuo estos tre ebla, kondiĉe, ke kelkaj el niaj societanoj bonvolu firme promesi sendi regule artikolojn aŭ sciigojn.

Li legas leteron, kiun li ricevis jam de longe de Sro Ĉejka, en kiu estas montrita, kiel oni povas kunlabori al la revuo.

Sro Jacobs tuj estas elektita unuanime helpa kasisto kaj helpa administranto de la gazeto.

La ĝenerala sekretario, je l' nomo de l' prezidanto, petos Sron Ĉejka, ke li transdonu al Sro Jacobs la dokumentaron de la societo.

Promesis sendi regule ĉiudumonate artikolon al Sro Jacobs, 444, Boomsche Steenweg, Antverpeno, Belgujo :

Sro Osk. Melzer, Annaberg. Str. 247. Chemnitz, Germanujo.

Sro Aizière, Rue de Berlin, Alfortville, Francujo.

Dro Rudy Raleigh, N. C. Usono.

Sro Camescasse, 1bis, Rue Lallier, Parizo.

Sro Durieux, Rue de Bouvines, Lille, Francujo.

Sro Durieux klopodos, por ke la nunaj decidoj estu publikigitaj en Franca Esperantisto.

Li prezentas specimenon de internacia diplomo por lernantoj. Ĝin oni povas ricevi de la Franca Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Parizo, sendante respondkuponon.

Post mallonga paroladeto de Sro Camescasse pri la iniciatilo matematika, kies eltrovanto li estas, la kunveno estas fermata.

La prezidanto : DURIEUX. La sekretario : AIZIÈRE.

# SKOTA EDUKADO.

En Skotlando ekzistas leĝo kiu devigas infanojn ĉeesti la lernejon de la aĝo de kvin ĝis dekkvar. Ĝis la nuna tempo ne estis deviga ĉeestado ĉe lernejo post tiu aĝo. Kaj pro tio, unu el la plej urĝaj problemoj edukadaj en Skotlando estas tiu rilate al la gejunuloj, kies edukado finiĝas tute, atinginte la aĝon de dekkvar jaroj, kiuj ne iras al la Supera aŭ altgrada lernejo, kaj kiuj aŭ ne povas ĉeesti iajn vesperajn klasojn en lernejo pro la laboro pri kiu ili sin okupas dum la tago, aŭ ne volas zorgi plu pri edukado, eble pro tio, ke ne estas influo, publika aŭ privata, kiu igas ke ili ĉeestu la vesperlernejon.

Estas aro da gejunuloj, inter la aĝoj de dekkvar kaj dekok kiu nuntempe estas la plej nezorgata parto de la Skota loĝantaro. Kaj tamen la plej grava aĝo estas ĝuste tiu sama aĝo, de dekkvar ĝis dekok. Tiuj ĉi estas la jaroj etendeblaj kaj impreseblaj en la vivo de junulo aŭ junulino. Tamen, malfeliĉe, dum tiuj samaj jaroj oni permesas ke la skotaj gejunuloj eniru sencele en la labormondon. Ofte la junuloj komencas la stratkomercon, kun ĝia sencela celo, kaj poste oni aŭdas de la policestro ke du trionoj de la stratkomerculoj en kelke da niaj urboj sin trovas ĉiujare en la juĝejo. Knaboj estas permesataj forlasi la lernejon, milope, por fariĝi laborantoj en butikoj, portantaj komerĉajojn, k. c., kaj je la aĝo de dekses aŭ deksep, kiam ili estas tro maljunaj por tiu-ĉi laboro, ili revenas en la labormondon sen metio. Knaboj kaj knabinoj estas permesataj iri centope kaj milope, en okupon sen celo, kaj ankaŭ en ĉian laboron por viroj kaj virinoj. La sekvo, kompreneble, estas, la formado de multe da senokupatoj, kaj multe da senokupuloj.

Feliĉe, per la Skota Edukada Leĝo de 1908, la Edukadestroj en Skotlando havas la rajton kaj povon por devigi gejunulojn ĉeesti la lernejon, (eble vespere), ĝis la aĝo de dek sep. Ĝis nun la estroj ne deziris uzi tiujn povojn. Tamen, tiun ĉi jaron, la Glasgovaj Edukadestroj decidis efektivigi la leĝon pri deviga ĉeestado, almenaŭ rilate al multe da gejunuloj. En Skotlando sin trovas en ĉiuj elementaraj lernejoj plej maljuna klaso, nomita la

« Qualifying » (Ekzamenota) klaso. Kiam infano pasigis, ni diru, ses monatojn en tiu ĉi klaso, je la fino de tiu tempo ĝi devas sukcesi je ekzameno. Tiuj kiuj sukcesas, estas permesataj iri al la pli altaj klasoj, nomitaj la « Supplementary » (Aldonitaj) Klasoj, aŭ, laŭvole, ili povas ĉeesti altgradan lernejon. La laboro en tiuj ĉi « Supplementary » Klasoj estas diversa — ofte dependas de tio, ĉu la kvartalo estas komerca aŭ laborista. Sed en ĉiuj tiuj klasoj oni konigas al la geinfanoj, la britan literaturon, kaj samtempe instruas al ili pri la kreskado de la gravaj institucioj en la lando, kiel la parlamento, k. c., kaj tiamaniere, oni larĝigas la fundamenton de la edukado kaj igas ke la geinfanoj poste fariĝu pli indaj urbanoj kaj regnanoj.

Kaj tial la Glasgovaj Edukestroj decidis ke ĉiuj infanoj, kiuj forlasos la lernejon je la aĝo de dekkvar, ne pasiginte almenaŭ unu jaron en la « Supplementary » Klaso, estos devigataj ĉeesti la vesperlernejon ĝis la aĝo de deksep. Post kelke da jaroj, la sekvo de tiu ĉi decido pri la gejunuloj skotaj, aŭ almenaŭ glasgovaj, estos grava kaj, mi kredas, bonega. Eble la bona sekvo estos : laboristoj pli lertaj, kaj urbanoj kun pli larĝa vido de aferoj. Kompreneble, tiu ĉi deviga vespera edukado estas nur eksperimento, kaj certe ne la plej bona metodo, ĉar la plimulto da edukistoj en Skotlando scias ke la infano kiu laboris dum la tuta tago, je la fino de la tago ne estas sufiĉe vigla por la vesperlernejo. La plej bona metodo, do, eble la estonta metodo, estus la duontaga laboro kaj la duontaga lernejo, tute ne trudante la lernejon al la vesperaj horoj.

DAVID KENNEDY, M. A.
134, Ingleby Drive,
Glasgow,
SCOTLAND.

---

## El historio de la Bohema popola lernejo.

Bohema lernejo elementara koncerne la disvastigadon de la kulturo certe povas egali je la popolaj lernejoj de l'okcidentaj

nacioj. Sed por nacia lernejo bohema ne estas la politika situacio en Aŭstrio favora. La Bohemoj estas devigataj preskaŭ por ĉiu nacia lernejo konduki persistan politikan batalon.

Hodiaŭa popola bohema lernejo komencis la 8-an de Septembro de la jaro 1848, kiam estis donita la regna ordono, ke en ĉiuj elementaraj lernejoj oni devas instrui en lingvo nacia. En la jaro 1855 estis donita la lernejo elementara sub la administrado de la katolika eklezio. Per fundamentaj ŝtataj leĝoj publikigitaj la 31-an de Decembro de la jaro 1867 estis proklamita la popola lernejo kiel interkonfesia. Per regnaj leĝoj publikigitaj la 25-an de Majo de la jaro 1868 estis liberigita lernejo de katolika eklezia administrado kaj estis donita al ĝi ĝis nun ekzistantan planon por la instruado. La parlemento propri̇gis al si la rajton fari la lernejajn leĝojn, kvankam ĉi tiu rajto konvenis ĝis nun al la landaj parlamentoj. Tiamaniere fariĝis de tiu tempo tre malfacila por negermanaj nacioj en Aŭstrio doni al la popolaj lernejoj nacian karakteron.

Laŭ ĉi tiuj novaj leĝoj ekzistas 1-8 klasa popola lernejo, en kiu laŭeble estas la lernantoj dividitaj laŭ la sekso. Post la elementara lernejo sekvas tri klasa lernejo burĝa por kuaboj eĉ knabinoj. La vizito lerneja estas deviga kaj daŭras de la 6a ĝis 14a jaro de la aĝo. Pri la lernejaj konstruaĵoj kaj ĉiuj bezonoj lernejaj zorgas ĉiu komunumo mem. La salajron al la instruistoj pagas la lando. Laŭ la leĝoj publikigitaj la 19-an de Februaro de la jaro 1870 oni devas konstrui la lernejon ĉie, kie dum kvin jaroj estas ĉiam meznombre 40 infanoj, kiuj havas la devon vizitadi la lernejon. Se estas en lernejo 80 infanoj, oni devas malfermi novan klason. Krom la elementaraj lernejoj ekzistas la infanaj ĝardenoj, kiujn vizitadas la infanoj de 4 ĝis 6 jaraj.

Laŭ la sumigo de la popolo en la jaro 1900 konvenas unu elementara lernejo al 1754 Bohemoj en Bohemujo, 964 Bohemoj en Moravio, 1110 Bohemoj en Silezio kaj 31160 Bohemoj en Malsupra Aŭstrio! La institutoj por la instruistoj, kiuj havas la tipon de la mezgradaj lernejoj, estas en la landoj de la korono bohema 16 kun bohemlingva instruado. En Bohemujo ekzistas 12, en Moravio 4, en Silezio neniu.

Ofte okazas, ke la komunumo, kiu havas la estradon kun germana plimulto, ne volas konstrui la boheman, kvankam ĝi tiel agas kontraŭ la leĝoj. Tiamaniere la Bohemoj estis devigataj helpi al si mem. En tio ĉi restos la Bohemoj ĉiam la ekzemplo de la nacia oferemo. Oni batalas precipe por la bohema lernejo elementara. En le jaro 1881 estis fondita la lerneja societo nomita « Ustrèdni Matice Ŝkolskà », kiu el la monaj sumoj kolektitaj inter la bohema popolo fondas la necesajn bohemajn lernejojn.

Se post kelke da jaroj la nombro da bohemaj lernantoj pruvos, ke la lernejo estas bezona, estas la komunumo per jurista proceso devigata la boheman lernejon konstrui. Multegaj bohemaj lernejoj elementaraj, burĝaj kaj mezgradaj estis tiamaniere fonditaj. En Vieno tiu ĉi tasko plenumas la societo « Komensky », kiu fondis en Vieno per privataj monaj kolektoj jam 6 bohemajn lernejojn elementarajn. Jam tre ofte estis pruvita la neceso de la bohemaj lernejoj en Vieno, sed la registaro ne havas la kuraĝon, por devigi la vienan komunumon plenumi tian ĉi devon.

Alie la leĝoj de la jaroj 1868 kaj 1869 al bohemaj lernejoj elementaraj eksterordinare utilis. Dank'al ĉi tiuj leĝoj apartenas nune la landoj de la korono bohema (Bohemujo, Moravio kaj Silezio) laŭ la statistiko al la plej kulturaj landoj en Aŭstrio. Kontraŭe en Polujo, kie estas aŭtonomio koncerne lernejajn aferojn, estas plej granda procento da analfabetuloj. Sed nia registaro ĉirkaŭ la jaro 1863 estis progresema, nune bedaŭrinde estas klerikala. Pro tio la registaro jam kelkefoje penis la liberalajn leĝojn de la jaroj 1868 kaj 1869 aliformigi kaj kulturon de la popolo malaltigi. La registaro jam pli ofte proponis la malaltigon de la lerneja vizitado de 8 jaroj ĝis 6 jaroj. Ankaŭ la klerigon de l'instruistoj ĝi penis malaltigi. Dank'al Dio, preskaŭ ĉiuj ĉi tiuj provoj ne prosperis. Sed tamen estas necese konstante maldormi, ĉar la deziro de nia registaro sufoki la kulturon de la popolo, estas konstanta pli kaj pli kreskanta.

ANTONIN VALOUŜEK,
Medlândky (u Brno),
MORAVIO (Aŭstrio).

# DIVERSAJ SCIIGOJ.

La estraro de I. A. I. sciigas ke nur tiuj personoj, kiuj pagis sian kotizaĵon por la jaro 1912 al la nuna kasisto Sro J. Jacobs, Boomsche Steenweg, 444, Antwerpen, Belgujo, estas membroj de tiu asocio kaj rajtas ricevi senpage ĝian oficialan organon I. P. R. Ĉion, kion oni sendis aŭ ankoraŭ sendos, ĉu mono, ĉu artikoloj aŭ libroj, al la antaŭa kasisto, Sro T. Čejka en Bystrice-Hostyn, Moravio, Aŭstrio, estas perdita por I. A. I. kaj I. P. R., ĉar li volas absolute nenion transdoni al Sro J. Jacobs kaj eĉ ne kredas necese respondi al la diversaj oficialaj petoj senditaj de I. A. I. Tia agmaniero estas tute nekomprenebla de ĉiuj kiuj konas Sron Čejka. La estraro de I. A. I. esperas ke pro tio oni ne malkonfidos nian asocion kaj ke oni klopodos kun ĝi ankoraŭ pli forte por kontraŭbatali tiun malhelpantan agon. I. A. I. esperas certe ricevi la realiĝon de la antaŭaj membroj kaj de multaj aliaj gekolegoj.

Ordinaraj membroj pagas ĉiujare 1 Sm. (fr. 2.50); propagandaloj almenaŭ ĉiujare 4 Sm. (fr. 10); donaculoj almenaŭ ĉiujare 10 Sm. (fr. 25). I. A. I. akceptas dankeme ĉiujn donacojn, kiuj helpas ĝian agadon.

N.-B. — La estraro de I. A. I. insiste petas la tutmondan ĵurnalaron represi tiun ĉi sciigon.

---

La administranto de I. P. R. faras alvokon al ĉiuj membroj sendi kiel eble plej ofte artikolojn por ĝi; nur tiamaniere la revuo vivados.

---

Avizoj de la redakcio. Nepresitajn manuskriptojn ni resendas nur tiam, se oni aldonis poŝtpagon por resendo. — La redakcio konservas por si la rajton korekti laŭ bezono la manuskriptojn. — Represoj kaj tradukoj de niaj artikoloj estas permesataj, se ili ne estas speciale rezervitaj. Sed oni ĉiam citu nian revuon kaj sendu al ni, se eble, almenaŭ 1 ekzempleron de la tradukaĵo aŭ represaĵo. — En la fako « Bibliografio » estos registrataj nur tiuj gazetoj aŭ libroj, en kiu ajn lingvo, de kiuj venis almenaŭ 1 ekzemplero. — La redakcio respondas letere aŭ poŝtkarte nur tiam, se oni aldonis por la respondo internacian respondkuponon aŭ respondkarton.

---

Oni ne juĝu nian revuon sole laŭ tiu ĉi kajero. Ĝi tute ne prezentas efektiviĝon de nia idealo! Ĝi estas nur provo, sufiĉe rapide redaktita por doni kiel eble plej baldaŭ sciigojn pri la definitiva refondo de nia asocio kaj ĝia organo.